


★  
**internacia  
pedagogia**

**REVUO**

Photo U.N.E.S.C.O.



Eric SCHWAB n° 3.941

4-a Jaro

N° 1

## *Internacia pedagogia revuo*

Aperas sub la aŭspicioj de G.E.E., franca asocio de esperantistoj edukistoj

### NIA KOVRILFOTO

**Homoj kontraŭ nescio.** Malsato, malpuro kaj malsano estas malamiko de la civilizo, kiuj iras man-en-mane kun nescio. En komunumaj centroj kaj en plenaeraj klasejoj, kiel ekzemple la jena ĉe Mysore, Hindio, Unesko, per helpo de veturanta kinejo kaj de la radio, celas levi la vivnivelojn per fundamenta edukado.

### ENHAVO

- Paĝo 65. — **La nekvieta adolescanteco** (D-ro Ch. Penz).  
 — 67. — **Pedagogoj kaj gepatroj** (Pál Balkányi).  
 — 69. — **La Bublernojo** (F-ino Gallet).  
 — 70. — **Por Internacia Jaro Pri Edukado**  
 (C. Freinet).  
 — 71. — **Teatro por la junularo** (C. Nicolai).  
 — 73. — **Ĉarto de la edukprincipoj demokratiaj.**  
 — 75. — **Manskribo** (E. E. Yelland).  
 — 77. — **Esperanto en finna lernejo** (Vilkki-Setälä).  
 — 80. — **Sur vian librobretton.**

**Ĉion por la redakcio:** artikoloj, informoj, recenzotaj libroj, oni sendu al la **Redaktoro:**  
 A. ALBAULT, 8, avenue Et. Billières  
 TOULOUSE (Francio).

**Ĉion pri administrado:** abonoj, provsendoj, specimenoj, oni sendu al la **Administranto:**  
 DELAGNEAU, Avrolles  
 par ST-FLORENTIN (Yonne) - Francio.

**ABONO:** 500 fr.F. pojare: vidu 3-an kovrilpaĝon.

**Anoncetoj, reklamoj,** oni sendu al: F-ino G. JOUBERT, 21, rue Renault, SAINT-QUENTIN (Aisne) - Francio. P.C.K. LILLE 3041-30.

**TARIFO:** Anoncetoj; 6 fr.F. = 0,20 stelo po vorto aŭ mallongigo.

Reklamoj: 1/1 paĝo 5.000 fr.F.  
 1/2 paĝo 3.000 fr.F.  
 1/4 paĝo 1.600 fr.F.  
 1/8 paĝo 900 fr.F.  
 1/16 paĝo 500 fr.F.

Rabato 10 % por sama teksto en 2 numeroj.  
 20 % por sama teksto en 3 numeroj.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la koncernan adreson antaŭ la 20<sup>a</sup> de la antaŭa monato.

La revuo aperos fine de Januaro, aprilo, julio, novembro.



MORALO EN AGADO :

# La nekvieta adolescanteco

de **Charles PENZ**

*Doktoro pri Beletro*

La afero komenciĝis per telefona komuniko laŭ indigna tono.

« Halo! Tie ĉi la direktoro de la lernejo Vaugelas... Mi petas la permeson definitive eskludi el mia lernejo lernanton, kies konduto ne plu estas elportebla.

— Pri kio li kulpas?

— Li estas 15-jara knabo, fortike konstruita, kiu pasigas la tempon boksante siajn kamaradojn; hodiaŭ matene li aŭdacis frapi ekstran klasestron.

— Mi komprenas vian reagon, sed se ni definitive forĵetas lin, ni ne plu povos iel ajn helpi lin. Ni do punos lin per tempo de eskludo, kiam vi estos sendinta al mi skribitan raporton. Sed mi tre deziras koni tiun kulpulon. Bonvole igu konduki lin ĉe mia oficejo. »

Kelkajn momentojn poste, mi vidas en mia oficejo la plej belan kapon de brutulo, kiun eblas imagi. Sultrolarĝa burŝo, kun kolo de taŭro, malalta frunto, fuĝanta rigardo. Mi ironie gratulis lin, tiel bone ludi sian rolon kaj neniel penis trovi la vortojn, kiuj montris mian malkontenton.

Anoncinte al li, ke li estos eskludita el la lernejo dum unu semajno, mi aldonis:

« Se ne ĉio estas tute malbona en vi, (mi opinias, ke mi eĉ diris: putrita), mi tuj proponos ion al vi. Vi estas forta, vi havas solidajn pugnoj, vi ŝatas esti venkanto. »

Ce tiuj vortoj, la brutulo ŝajne reagis: videble, li aŭskultis min.

« Ĉu vi scias, kio estus neatendita? Tio, ke ĉe via reveno en la lernejon, vi konduku trankvile. Ĉiuj viaj kamaradoj kaj eĉ viaj klasestroj estus surprizitaj. Ĉiuj imagas, ke vi ne kapablos pliboniĝi kaj ke baldaŭ vi estos forĵetita por ĉiam. Nu! Se vi estas sufiĉe forta por ŝperregi vin, por boksi la propajn difektojn, vi restos en la lernejo, vi daŭrigos viajn studojn, kaj la hodiaŭa incidento estos komplete forgesita... Mi petas de vi neniun promeson. Ne respondu al mi. Sed, post unu semajno, kiam vi retroviĝos inter viaj kamaradoj, ni vidos ĉu vi estas vere forta aŭ ĉu vi estas nur senkuraĝulo... »

Mi parolis kun konvinko, sed mi estis certa pri nenio. La tagoj pasis kaj mi forgesis la incidenton. Proksimis la lerneja jarfino. Dum la ekzamenperiodo, ne plu estas tempo por pensi pri la individuaj fatoj.

Poste alvenis la tago de la granda lerneja festo, kiu okazis en la plej bela parko de l'urbo.

Post la fino de la festo, mi foriris de la oficiala tribuno kaj aliris al unu el la elirejoj. Ĉe ĉiu pordo ordoservo estis organizita. Unu el la junaj « gardistoj » salutis min, skizante rideton iom ĝenomotron. Mi rekonis la boksulon, la brutulon, kiun mi estis taŭzinta kaj kiu estis pliboniĝinta en tia grado, ke ne nur eĉ ne unu parolis al mi pri li, sed ankaŭ ke oni komisiis lin pri konfida posteno.

Mi premis lian manon gratulante lin mallonge, ŝajnigante trovi tute natura tian transformiĝon, kiu restis unu el la plej bonaj memoraĵoj de mia kariero.



Ofte mi rakontis tiun anekdoton al edukistoj, kiuj opiniis sin pravaj malesperi. Miaflanke, mi opinias, ke oni neniam rajtas malesperi pri homo kaj precipe pri adoleskanto\*). Kio necesas, tio estas juste puni lin, ĉar ĉiu malforto kuntrenas katastrofojn.

Kio ankaŭ necesas, tio estas etendi al li la savostangon, aŭ pli ĝuste montri al li, ke la savostango ekzistas kaj estas trafebila de li: se li volas ĝin kapti, li savos sin mem. Adoleskanto estas pli sovaĝa, ol la arbaraj bestoj: li fidus sin mem kaj sian junan povon, sed li ne scias kiel ĝin uzi. Necesas do montri al li la vojon, sed ne substitui niajn strebojn al la liaj.

De la 15a ĝis la 20a jaro, adoleskanto diras « ne » al sia familio. Li vivas en kvazaŭ konstanta stato de ribelo kontraŭ la tro amemaj adoltoj, kiuj jam de lia naskiĝo lin ĉirkaŭas per zorgoj kaj konsiloj. Senpacience, li kalcitras inter la timoj, kie lia opinio ni volas lin trude teni, nezorgante pri liaj veraj interesoj, kiujn li eĉ ne imagas nete. Adoleskanto ankoraŭ ne konas la Socion, en la senco, kiun la homoj donas al tiu vorto. Il ne scias, kion li jam ŝuldas al ĝi nek kion li ŝuldos, laŭlonge de l'vivo. Sed kiel al sia familio, li diras « ne » al la Socio, esperante esti libera, plene evolui sen trudo.

Adoleskanto estas el la aĝo de la absolutaj sentoj. Li malfidas la adoltojn. Li timas la konsilojn, en kiuj li antaŭsentas ĉiajn malpermesojn. Li ne volas lerni konduton. Ĉar li scias nenion kaj ĉar oni mallerte memorigas tion al li, li opinias ĉion scii. Li ankoraŭ ne eraris, ĉar li ankoraŭ ne komencis ludi. Tial li estas certa gajni. Al kio taŭgas sekvi la konsilojn de spertuloj kiuj ofte estas nur mallertuloj laŭ lia vidpunkto. Li kapablos sukcesi ĉi kie ili fiaskis. Tiu impertinenteco kaj tiu simpleca kuraĝo estas, entute, pli simpatiaj ol la konformismo kaj la rezignacio, pri kiuj certenaj adoltoj ege lacigitaj de l' vivo volus ekzempli al la junularo.

Ne estas facile, sed estas necese helpi la adoleskantojn transiri tiun malfacilan pasejon. La veraj edukistoj scias kiel kuraĝiga kaj rezultodona estas tiu tasko. Atentu ne « pontifiki », sed diru al la junuloj: « Mi ne estas el alia materio ol vi; ne opinio ke mi bezonas solvi neniun problemon, venki neniun malfacilaĵon. Sed mi povas helpi vin transgrimpi la obstaklojn, ĉar mi jam vivis iom pli longe ol vi. En realo ni estas asociitoj. »

Maloftas, ke tia parolmaniero renkontas verajn surdulojn. Sed necesas, ke la adolto konsciu pri sia povo kaj ne nur pri sia devo. Kiam okaze mi dubas pri tio, memorado pri mia boksulo sufiĉas « re-surseligi » min.

Charles PENZ,

Inspektoro de la Unuagrada Instruado.  
Doktoro pri Beletro.

(El « Education Nationale », 21 nov. 57, tradukita kun permeso).

\*) Adoleskanto: pli bona formo por adoleskulo.

## De la Redakcio

*De niaj legantoj el ĉiuj landoj, ni ricevis tiom da bondeziroj, kiel personaj, tiel ankaŭ por la prospero de nia revuo, ke ne eblas respondi al ĉiu aparte.*

*Niaj karaj legantoj trovu ĉi tie niajn plej bonajn dezirojn por la nova jaro: sano kaj feliĉo kaj super ĉio sekurigo de la tutmonda paco al kiu ja kontribuas per siaj proraj rimedoj nia movado!*



# RILATO DE LA PEDAGOGO KUN LA GEPATROJ

## El spertoj de hungara klasgvidanta instruistino



En Hungarlando - simile, kiel en aliaj socialistaj, popoldemokrataj ŝtatoj - oni bone scias, ke la lerneja instruado ne povas esti ia aparta agado. Ĝin devas kompletigi la hejmo, la vivo kaj okupiĝo en la familio, la konduto de la gepatroj al la infanoj.

Pro tio jam delonge funkcias la gepatraj komunumoj, kiujn vokas al kunsidoj la lernejoj, por tie kune kun la instruistoj, ĉefe kun la klasgvidanta instruisto en Hungarujo oni nomas ilin ankaŭ en la mezlernejoj « Profesoroj » ili priparolu la lerneajn kaj lernadajn demandojn, la kondutojn kaj malfacilaĵojn de la lernantoj. Membroj de la gepatra komunumo, plej ofte virinoj - kiuj eble pli multe taugas por tio, ol viroj aŭ havas pli da tempo? - regule vizitas la gepatrojn, sed laŭeble vizitas ilin la klasgvidanta instruisto.

Pri tia vizito raportis hungara ĵurnalo « Nepakarat » kaj ties ĉefajn partojn mi konigas nun. Estus interese kaj spertodone se ankaŭ el aliaj landoj oni konigus tiajn okazojn. Ĝi pruvu, kiel grava estas la rekta rilato inter la pedagogo kaj la gepatroj, kiel bona estas reciproke scii por geinstruistoj kaj por gepatroj, parencoj, kiel lernas, vivas, progresas la lernantoj, kie necesas helpo aŭ ŝanĝo! La raporto skribas pri instruistino (profesorino), kiu vizitas la hejmon de sia lernanto, Johaĉjo. Post la lernejaj horoj ne estis facile por ŝi supreniri piede tri etaĝojn - kaj eble neniu estos hejme. Ŝi konis sinjorinon Kerekes; ŝi neniam forestis de la gepatra kunveno, sed kelkfoje eĉ aparte venis en la lernejon « por malgranda interparolo. » Oni konis ŝin, kiel bonintencan patrinon, kiu eĉ sian laborlokon forlasis, por povi pli multe okupiĝi kun sia infano. Kvankam kvarope ili vivis el la salajro de la edzo. Tiel la instruistaro, kiel ŝi mem nun estis embarasita ĉar ili ne komprenis, ke infano, kiu ĉion ricevas hejme, el tri studobjektoj staras ĉe la malsukceso. Sinjorino Kerekes mem malfermis la pordon: « Ĉu estas denove io malbona ĉe Johaĉjo? » ŝi demandis zorgeme. « Mi vidis en la « avertilo » (kion la infanoj hejmenportas), ke li el hungara lingvo kaj matematiko staras je malsukceso. Sed bonvolu diri, kion mi faru? Mi eĉ donas mian koron, ke li lernu. Ŝi parolis rapide, rapsode, eĉ kelkefoje haltis ŝia voĉo. Bonvolu aŭskulti min. Mi ne povas bridi la infanon. Mi ne povas kontroli lin. Ja bonvolu kredi al mi, ke mi laŭvorte lernas kun li la lecionon, se mi scias, kio estas la tasko. Ĝis tiam li ne rajtas ludi, ĝis la tasko ne estas farita. Nun, mi tamen ne scias, kiel li staras el historio, el geometrio? Pri kio li devas pretigi sin dum la ferio (estis dum la novjara kelksemaĵna feriotempo), kvankam mi vizitis eĉ gesiniorojn Balla en la unua etaĝo por demandi ĝin? Lastfoje, kiam li denove hejmenportis avertilon, mi tiel batis lin kun la polvofrapilo, ke oni povis vidi sur li eĉ post du semajnoj... Bonvolu do diri, kion mi faru? Iel oni ja devas disciplinigi lin. »

En la malgranda notkajero apud la nomo de Johaĉjo Kerekes aldoniĝas naŭ vortoj: « Malfortkaraktera infano, oni devas pli bone kontroli lin. » Ŝi inter-



konsentas kun la patrino, ke kun subskribo de la fakinstruisto de nun en la « lecionkajero » ĉiutage estos enskribita, kio estas la aktuala lernotaĵo.


« Ĉu helpas al vi tiu ĉi infano? » La demando estis neatendita, ne kutima. La panjo estas en embaraso. « Li kutimas helpi viŝi la potojn, telerojn, kekfoje suprenportas ankaŭ hejtilon, sed li estas malforta fizike. Do mi pli volonte men faras ĝin, mi kompatas lin por laborigi. » La instruistino parolas ankoraŭ pri la ĝusta tempodivido - oni ne devigu la infanon, ke li lernu la tutan posttagmezon, li havu tempon ankaŭ ludi, sed li ankaŭ helpu al sia patrino - kaj pri tio, ke sinjorino Kerekes ne tiom dorlotu lin, ke ŝi eĉ « kvazaŭ la manĝaĵon maĉas por li antaŭe. » Alia vizito: Ĉe familio Halász ŝi trovas hejme nur la avinon. Loĝejo aranĝita per burĝa komforto. Tri grandaj ĉambroj kun kameno en la angulo. Elegantaj kusenigitaj brakseĝoj, agrablaj tapiŝoj. Tie vivas Petro el la sesa klaso, la « forto de la klaso ». Kaj tie li estas tiel malfeliĉa?... Ĉar li estas! Estis ĝuste dum la geometria leciono. La rigardo de Petro Halász ne estis direktita al ŝi, kiel alfoje, sed tra la fenestro ien en la malproksimon. Tiu nekutima afero tiel embarasis ŝin, ke ŝi alvokis lin. La infano ruĝiĝis kaj ekstremitis. Poste ŝi rimarkis, ke grandaj, grasaj plorgutoj rulas sur lia vizaĝo kaj falas en la geometrian kajeron, ĝuste tien, kie oni estus devinta desegni la ortangulan triangulon. Baldaŭ oni sonoris. La leciono finiĝis. Ili restis nur duope en la klaso. « Ĉu estas io en neordo hejme? » ŝi demandis. La infano nun jam klinis sin sur la tablon kaj tiel ploris. « Jes, - li respondis plorĝeme - miaj gepatroj volas ekседziĝi... Mia panjo ne venis hejmen iam de kvar tagoj kaj mi vane serĉis ŝin en la oficejo, kie ŝi laboras, ĉar ankaŭ tien ŝi ne iras. » - Spontane venis el mia buŝo la demando: « Vi dezirus prefere resti kun panjo? » Tre serioze kaj maljunece li respondis: « Kune kun paĉjo kaj panjo. Mi dezirus, ke ili repaciĝu! »

De tiu tempo ŝi observis Petron. Ŝi vidis, hejme ankoraŭ ĉiam estas ordo. Pri tio ŝi deziris paroli kun la gepatroj. En intereso de la infano. Sed nun ne sukcesis. La avino nur malfacile varmiĝis, sed poste - verŝajne la zorge sekretigita amareco - trabatis la kluzon de la retenemo. « Mia filo estas tre pacienca homo. Ne pro tio, ĉar li estas mia filo, sed la tuta domo miras, ke ili ankoraŭ vivas kune... » Ŝi daŭrigas mallaŭte: « Sed pro Dio! Ne diru tion al iu... Ŝi ne devus iri labori, mia filo estas inĝeniero kun bona salajro. Sed « por ŝi » la mono estas ĉiam ne sufiĉa. Mi ĉiam diras al ili, ke ili konsideru almenaŭ la infanon. »...

Ŝi bedaŭris, ke ŝi ne trovis hejme la gepatrojn, kaj ke ĝis nun ŝi neniam sukcesis renkonti ilin. Al la gepatra kunveno venis la avino kaj eble dufoje ŝi vidis sinjoron inĝenieron Halász, sed kiam ŝi eliĝis el la ringo de la patrinoj, kiuj ŝin ĉirkaŭis, ŝi iam ne povis trovi lin. En la notlibreton ŝi enskribas: « Denove viziti gesinjorojn Halász. Urĝa ». Dufoje substrekis tion. Oni nepre devas diri al ili, ke Petro regresis el pluraj studobjektoj. Ke ilia familia kverelo havas tre malbonan efikon al la infano. Ke ili pripensu ĉiun vorton, kiun ili elparolas antaŭ li, ĉar li ĉion ensorbis terure seriozan... Kaj ankoraŭ ion: oni ne povas subaĉeti la infanon per donacoj. Hazarde ŝi aŭdis interparolon de Petro kun ia samklasano: « Kion vi ricevis je Kristnasko? » demandis la alia. « Glitilon kun ŝuoj. » - Vi havas ŝancon. Diru, kion vi ne ricevas hejme? » - « Nu tion, kion mi ne petas » respondis Petro kun tono de infanoj tro frue maljuniĝintaj.

Vesperigās. La profesorino devas ankoraŭ iri aĉeti kaj kuiri vespermanĝon. Sia edzo, distrikta kuracisto, certe jam estas hejme kaj atendas ŝin senpacience, ankaŭ ŝia trijara filineto. Jen ankaŭ tiu ĉi tago pasis kaj ŝi iris nur ĉe du familioj. Kaj en la klaso estas sesdekkvar infanoj...

*Rerakonto de Pál Balkányi, Budapest.*





# La Bublernejo

## Ties celo :

« Fiksi la faton » de la juna infano, harmonie disvolvante ĝin laŭ principoj de ordemo, tio en sereniga kaj bonefika ametosoj.

Ĉe la bublernejo, la infano devas sanflori fizike kaj morale; en forto, gracio, kondutospirito.

Ĝen kuŝas nia celo kaj tuta programo. Kiel sukcesi?

Ĉu sekvi metodon (MONTESSORI) aŭ sistemon (DECROLY)?

Ne, sed ĉiu instruistino ekspluatu laŭplaĉe ties influojn.

La Franca bublernejo celas ĝustan ekvilibron inter tiuj diversaj tendencoj kaj influoj. Ĝi provas akordiĝi :

✱ la liberecon de instruistinoj, kun ties submetiĝo al oficiale komunaj reguloj,

✱ la ekfloriĝon de spontanemo ĉe la infano, kun ties akcepto de necesa disciplino.

✱ la respekton al la natura ritmo de ilia disvolviĝado, kun instruoj pri la nepraj konvoj,

✱ la malsamecon inter la bublernejaj metodoj, kaj tiuj de la unuagrada lernejo, kaj tamen la preparadon al la infanoj, por transiro de bublernejo al unuagrada lernejo.

La bublerneja instruistina profesio enhavas ion apartan, ĉar biologoj, fiziologoj, infankuracistoj, psikiatroj agnoskis ke la infaneca periodo, ek de la 2-a ĝis la 7-a aĝjaro nome: la aĝo de frekventado en la bublernejo, estas tiu kiam la sentokapablo, imago, karaktero, estas tiom impresataj, ke la tuta vivo de la iama infano, kiu fariĝis plenkreskulo, ne forviŝos tiun stampon; la konsisto de la interna vivo, fiksita je la sepjara aĝo, jam ŝanĝiĝos nemulte.

Sekve, la instruistino scias, ke ŝia agado devas celi kreadon de « etoso » kiu tuŝas la lokojn, aferojn, ritmon de la vivo, la bonefikon de kunesto, la esencon de la elvokataj bildoj, la tonon de la diritaj paroloj, la kvaliton de silentoj, la agadintensecon, la senteman interŝanĝon per amemo, kio ebligas al la infano disvolviĝi en konfido kaj ĝojo. La instruistinoj ankaŭ eksciis de la biologoj kaj fiziologoj, ke la vivo de la

infanoj estas submetata al la procezo de ilia kreskado kaj de ili cetere lernis, kiel sekvi ties diversajn stadiojn. La kuracistoj indikis la favorajn kondiĉojn por tio: nutrado, ripozo, aerumado, korpa ekzercado, kaj la psikologoj rekonis la interrespondecon de fizika kreskado kaj mensa evoluo ĉe infano, kun ties anomalioj. Iliaj plej valoraj konstatoj koncernas la kreskadon pristuditan, en evoluo de la nervaro, de la cerbo, sur tiu kampo, kie diferencigo inter fizikaj kaj mensaj fenomenoj estas ankoraŭ tiom nedeterminita.

La intelektaj kapabloj sinsekve ekaperas laŭmezure kiel la nervaro iĝas pli kompleksa, plimultiĝas kaj diferenciĝas la ĉeletoj. Sekve, ni disponas pri neniu efika rimedo, kapabla momente akceli la maturiĝon de la nervosistemo kaj sekve de la spiritaj fortoj.

Tial la instruistino devas montriĝi pli pacienca, pli konformiĝi al la naturleĝoj, pli atente percepti tiujn « sentoplenajn periodojn » kiam la sinteno de la infanoj, iliaj gustoj, inklinoj elmontras ke ili momente disponas pri energio dediĉotaj por iu aparta okupokampo; ili laŭvice trovas facilan aliron por la parolaĵo, skribado, legado, kalkulado, sinesprimo per vortoj kaj desegnaĵoj.

Tiu saĝa submetiĝo al la naturo havigas al la bublernejo ties efektivigitan ritmon kaj malrigidan karakteron.

La bublernejo gvidas la infanon al memforĝado de ties personeco, faciligante la naturan disvolviĝon de tio, kio en li estas kreiva libero. Nepras akceli per meminciata aktivaĵo ekaperon de tiu aliro al memkonscio, de kiu ĝojo estas la signo, kiu memkonscio serĉas esprimon sian en ĉiaj provoj de infana kreado, de la parolaĵo ĝis la mantaskoj, de skribado ĝis legado kaj liberaj verkoj, de fabelo ĝis la dramaj ludoj, de la skribajaĉo ĝis libera desegno, de la bela individua desegno ĝis la opa.

Tiu loko dediĉata al libereco, meminciata okupateco de la infanoj varias laŭ ties aĝo, laŭ la ekzercoj al ili proponataj aŭ de ili elektitaj; de la dujara ĝis la kvarjara aĝo, iliaj ludoj kaj ekzercoj estu liberaj; sed, laŭmezure kiel la infano kreskas, kiam egoismo ĝia fariĝas tirana, nepras tiun ĉi regi kaj iom post iom sociemigi; ĝi libere kreu per modlopasto, kraĵonoj aŭ peniko,



verkojn per kiuj ĝi imagas la mondbildon, ĝi serĉu mem la takton kiu akordigos ĝiajn piedojn, brakojn, imagojn, pensojn, kun la muziko kiun ĝi aŭskultas, sed ĝi akceptu la al ĝi konfiditan rolon en drama ludo, ĝi submetiĝu al la ripetado, kiu fikso en ĝi la memoron pri la poemoj, kantoj, ĝi kapablu silenti por aŭskulti fabelon, ĝi respektu la aktivajojn de siaj kamaradoj.

Resume: ĉio estas ludo en nia regno de l'infanoj, ĉio estas ĝojo; sed tiu ludo, tiu ĝojo devas penetri la misterajn fontojn de

la estonta vivo de la infano, vekti en ĝia sentokapablo inklinon al feliĉo, vero, amo, havigi al ĝia imagpovo vojprovizojn, doti ĝian aktivecon per la manieroj de lojala laboranto.

Verkis: F-ino GALLET.

el la franca, esperantigis la TRIOPO:

Lucien BOURGOIS,

Marcel LESOIN,

S<sup>ro</sup>. DUFLOT.

---

## POR INTERNACIA JARO PRI EDUKADO

---

« La infanaĝo restas enigmo », skribas la ĉefartikolisto de grava monata revuo, komentante la konkludojn de la Internacia Seminario pri Karakterologio... Nedeĉifrebla infanaĝo... La vero estas, ke la infanŝcienco ankoraŭ estas en la vindaĵo.

Inaŭgurante, en Sorbono, la dekkvaran Internacian Kongreson de la Moderna Lernejo (Pasko 1958) C. FREINET, la iniciatinto de la movado, diris:

« La scienca progreso nekontesteble, gravege antaŭen saltis en la lastaj jaroj: la homoj ĉiam pli rapide veturas, ĉiam pli foren vidas, kun mekanika kaj elektrona precizo ĉiam pli mirveka laboras. Ili estas pretaj por ektransformi la mondon.

« La « sputnikoj » kaj la « eksploreroj », estas la simboloj de tiu grimrado al la kulminoj de l'revado. La ŝtatoj jam dispartigas inter si la interstelajn spacon kaj ruzoplena komercisto provis vendi koncesiojn en la luno!

« Kaj tamen, granda malkvieto hantas la sipritojn kaj korojn ĉar tiu teknika progreso estas sen komuna mezuro kun la homa progreso, kiu lasta ŝajne prefere regresas. La homo pli ol iam ajn antaŭe staras sub la mortminaco de la energioj, kiujn li elkatenigis.

« Kaj tie kuŝas la dramo:

« La scienculoj konas ĉiujn sekretojn de la nuklea energio, sed ili ne eklevi la vualon antaŭ la elementa mistero de la homa sinteno. Ili lanĉas fuzaĵojn, kies falpunktojn ili kalkulas kun precizo de kelkaj metroj. Ili forŝvebigas satelitojn, kies trajektorion ili antaŭkalkulas kun impresa precizeco. Sed eĉ ne unu jam kapablas mezuri la trajektorion de la infanoj kiuj enviviĝas, kaj ni lasas la juĝistojn mortkondamni junulojn, preskaŭ infanojn, kiuj certe ne estus krimuloj, se la familio, la socio kaj la lernejo ne estus kul-pintaj gravajn erarojn ĉe ilia formiĝo kaj orientiĝo; se oni estus kapablinta ĝustatempe kompreni kaj helpi ilin; se oni estus povinta ilin religi al la vivo kaj klerigi ilin de homa penso kaj idealo.

« Ni ne troigas asertante ke la psikologia scienco kaj sekve la pedagogia scienco, la scienco pri edukado, ankoraŭ estas en la vindaĵo. Estas kvazaŭ, apud la vasta uzino inundata de lumo kaj trastriata de fulmoj, ankoraŭ vivus en groto, kun ilia prahistoria lumilo kaj iliaj rudimentaj iloj, malfruiĝintaj kaj malkvietaj homoj, kies spirito restas mistero kaj kies vivo restas bremsa aŭ minaco ĉe la ariergardo de progreso.

« Reatingi tiun progreson estus la plej granda venko, pri kiu povus fieriĝi nia jarcento. »

Kaj rememorigante, ke la scienculoj de la tuta mondo estis mobilizitaj en 1958 por la geofizika jaro, kies rezultoj certe estas tre spektaklodonaj, FREINET konkludis petante ke la jaro 1959 estu deklarita « Internacia Jaro de la Edukado », kaj dum ĝi psikologoj, pedagogoj, psikanalizistoj, psikiatroj, gepatroj, politikaj kaj sindikataj organizoj metode studos, en granda internacia konkurado, la urĝan problemon de la infanaĝo kaj de ĝia onteco.

Dum la novembra monato, okdek naciaj delegacioj de Unesko kunvenis en Parizo por la Internacia Konferenco de Unesko. Ni deziras ke post propono de kelkaj naciaj delegacioj, la principo de « Internacia Jaro de Edukado » estu adoptita kaj ke senprokraste organiziĝu en ĉiuj landoj, preter la landlimoj, tiu universala konkurado por pli bona formiĝo, en la infano, de la morgaŭa homo.

La konkurado povas komenci. Sub la signo de « Internacia Jaro de Edukado » povas tuj komenciĝi la mobilizo de la homoj, de la asocioj kaj de la organizoj.

Marŝante oni provas la movadon. Kiu ekestriĝos fronte de la nepre necesa ofensivo?

C. FREINET.

---

**Materiale por la venonta numero** nepre atingu la redakcion en Tuluzo antaŭ la 20a de marto.



**C. Nicolai** (Nederlando) :

# ĈU PORLERNEJA PREZENTADO AŬ PORJUNULARA TEATRO?



De post la milito la jam longe ekzistanta sistemo de porjunularaj koncertoj ege divastiĝis en Nederlando, kaj flanke de tio oni ankaŭ pli kaj pli atentis pri teatro kaj baletoj en la formo de porlernejaj prezentadoj. Bonega institucio, kiun iom nun la instruistaro ja spertis kiel altvalora.

Tiuj « porlernejaj prezentadoj » havas du diversajn formojn. La pli malnova, aplikata por la pli junaj lernantoj kaj en malpliiganta nombro de mezgradaj lernejoj, estas tiu, en kiu la junularo venas klase al la teatro, kaj tie ankaŭ sidas laŭklase sub kondukado de la instruisto. Flanke de tio ekzistas la formo, en kiu la lernantoj - librere, kaj do laŭelekto - povas iri al speciala por ili aranĝita prezentado. Tiam ili venas individue kaj se iliaj instruistoj ĉeestas, ili NE sidas inter siaj lernantoj.

Tiu dua formo, kiun la aktoroj kaj dancistoj kutime ne nomas porlerneja prezentado sed porjunulara teatro, montriĝas havi tiom pli da avantaĝoj, laŭ opinio de la artistoj, ol la prezentadoj kie la publiko sidas laŭklase, ke, de artista flanko, oni verdire dezirus forlasi la malnovan formon. La argumentojn por tio oni precipe ĉerpas el la plej pura formo de porjunulara teatro, kiel ĝi nuntempe ekzistas en Amsterdamo kaj Hago kaj baldaŭ estos sekvata en Roterdamo.

La argumentoj ŝajnas psikologie tre akcepteblaj. Oni rezonas jene: se infanoj poklase venas al prezentado, tiu prezentado estas kvazaŭ plilongiĝo de la lernejo. Tio kaŭzas tute alian pozicion ĉe la junaj vizitantoj, ol kiam ili « vere » iras al la teatro. Unualoke ĉar klase ili venas kiel konfidinda kolektivo, dualoke ĉar nun ilia sinteno, ja eĉ ilia anticipa sento koncerne al la plenkreskuloj, estas iu kiu estas, bazita sur la disciplina rilato inter instruisto kaj lernanto.

Ankaŭ laŭ la multjara sperto de teatraj societoj kiel Puck, Scapino kaj Arena, « klasa » publiko estas multe pli bruema. En sia konfidinda kolektivo ĉiu el la infanoj sentas sin sekura kontraŭ sia ĉirkaŭaĵo (kaj la pliaĝuloj). Do kiam mallumiĝas, agitisto, de el tiu kolektiva unuanimeco pli facile decidus « turmenteti la instruiston » per bruado aŭ rimarkoj, ol kiam li venus individue kaj havus lokon kiel samvalorulo en salono tute plena je samvaloruloj.

Sed ne nur la aŭtoritata rilato inter instruisto kaj (en la mallumo ne videbla) lernanto efikas incite, ankaŭ la pozicio de tiu lernanto kontraŭ la vivanta teatro (ĉu teatro, ĉu baletoj) pro tio estas alia, malpli libera.

Prezentado antaŭ klasa publiko postulas pli da streĉado de la artistoj. En ilia pro-



pra eldiro: postulas de ni multe da tempo por ludi la salonon silenta, kaj venas multe pli da interrompaĵoj de « ŝercemuloj ».

× × ×

Kontraŭ ĉi tio oni metas la praktikon, kiel oni nun spertis ĝin nome dum kvin jaroj en la « Sabata Porjunulara Teatro » en Amsterdamo. Tie la infanoj venas individue. Ili ne venas por ion lerni, sed por iri al la teatro, kaj ankaŭ oni pritraktas ilin kiel normalajn vizitantojn. Tio do signifas: neniuj gardistoj por priatenti rompiĝeblajn spegulojn kaj aliajn aferojn, neniun avertan vorton de pliaĝuloj, nur maksimume, se necese la rimarko: « tion oni ne faras en teatro... » La akcento do falas sur la specialajn regulojn de la teatro kaj ne sur la pedagogian disciplinon.

La praktiko pruvis ke eĉ ses- aŭ sep-jaraj infanoj povas esti perfekte memstaraj en ĉi tiu medio. La plenaĝuloj liveras ilin en la vestiblo, la infanoj mem liveras sian vestaron, serĉas kun helpo de la gardistoj sian lokon kaj estas « vizitantoj » kvazaŭ ili estus plenkreskuloj. En kvin jaroj da Sabata Porjunulara Teatro neniam io malbona okazis. Eĉ ne pro la « malgrandaj necesajoj », kiujn ili dece retenas ĝis la paŭzo, ĉar ili estas « asistantoj » en la ludo, nomata teatra vizitado.

Tiun asistadon oni ankaŭ klare sentas sur la scenejo. La infanoj venas kiel individuoj, sed jam antaŭ la komenco de la prezentado partoprenas en la mistika kolektivo, nomata « publiko ». Montriĝas do

pli facile, individue asimiliĝi en la tutan kolektivon, ol kiam nombro da kolekti-vojoj (klasoj) devas kunfandiĝi en publiko. La atendo ankaŭ estas alia, pli direktas sin de el la infano mem al tio kion oni prezentos, ol de el la « komuna ĝojo kaj malĝojo » de la klaso.

Kiam do la kurteno leviĝas, la infano, de el sia pli granda kaj pli persona anticipe, pli facile submetas sin al tio, kio okazas sur la scenejo. Tio ja fariĝas nun rekta rilato kun la infano, ne distrita de la reagoj de plenkreskuloj, (ĉu gepatroj, ĉu instruistoj), al kiuj ĝi kutime ege direktiĝas. Cetere oni pli rapide kaj pli profunde atingas la junan publikon de « porjunulara teatro » pere de la prezentaĵo. Sed, kio estas ankoraŭ pli grava por la teatraj artistoj: ĝi estas atingata laŭ la « trafa », la sole ĝusta maniero, en kiu la vivanta arto atingu la publikon, en la persona interinfluo inter prezentantoj kaj ĉeestantoj.

Sajnas do avantaĝe, anstataŭi la sistemon de la porlernejaj prezentaĵoj per « porjunulara teatro ». Multaj plenaĝuloj tamen montriĝas timi, ke la junularo sen kontrolo ne dece kondutos. Rilate al tio, oni inyitis antaŭ kvin jaroj unu el la plej malfacilaj kaj maldelikataj lernejoj de Amsterdamo laŭ individua bazo al la tute nova teatro « de la Mar ». En la aŭtobuso ili bruegis kaj fariĝis pecoj, sed ek de la momento kiam ili, kune kun aliaj infanoj, estis en la teatro, kaj intence ne estis lokataj kune, ili kondukis kvazaŭ « sinjoroj ». La instruistoj malantaŭe en la salono ne kredis siajn okulojn. Nun ili trovas tion ordinara.

*Tradukis F-ino B. Leopold el: « Opvoeding nu »*

*(« Edukado nun »).*

---

**ĈU VI JAM SENDIS VIAN KOTIZON AL VIA LANDA PERANTO ?**

---



# ĈARTO DE LA EDUKPRINCIPOJ DEMOKRATAJ

---

De la 28-a de julio ĝis 3-a de aŭgusto en Moskva kunsidis Administra komitato de l'Internacia sindikata federacio de instruistoj (FISE) kun ĉeesto de delegitoj el 25 landoj. La ĉeestintoj juĝtaksis instruistan aktivecon kaj emfazis la grandan respondecon en hodiaŭa interpusiĝo de la progres- kaj reakciemaj fortoj. Unuanime akceptita propono de la CARTO de l'edukprincipoj demokrataj en la kunsido ellaborita kaj prezentota al plua diskuto de instruistoj kaj pedagogiaj laborantoj en unuopaj landoj, samkiel l'unanima akcepto de la ALVOKO al ĉiuj instruistoj kaj instruistaj organizaĵoj de la mondo al strebado pri konservo kaj firmigo de la tutmonda paco, signifas elstaran kontribuon al amikeca kunvivo internacia. Samtempe la kunsido aprobis proponon de Kontrakto pri kunlaboro kun Tutmonda konfederacio de instruistaj organizoj (WCOTP) kaj vicon da politik-organizaj aranĝoj pri pli intensa aktiveco internacia de l'instruistoj.

Eduko kaj instruiteco estas sociaj komponantoj, kies historia progresado havas senmezuran signifon. Demokrata eduko kaj kleriĝo kreas parton de nacia heredaĵo kultura. Ili devas disponigi novajn servojn, ĉar ĝenerala progreso en la eduko kaj kleriĝo estas grava faktoro liberiganta la homon el prema dependo al pli racia, materia kaj socia prosperado.

En samtempaj evolu-kondiĉoj de sciencoj, tekniko, produktado kaj de homara kulturo cetera, ĉiu nacio devas al siaj apartenantoj certigi plenan kaj harmonian edukon, kiu enhavu ĉiujn plej gravajn fakojn de homa aktiveco.

Akcentigo de la signifo kaj aŭtoritato de la lernejo estas inter unuaj devoj de la socio kaj ŝtato.

La eduko kaj kulturo en ĉiu lando estas propaĵoj kaj kreitaĵoj de tuta popolo disponigendaj en ĝiajn servojn. En tiu ĉi punkto la instruistoj havas precipe elstaran taskon, kiu firme ligas ilin kun la nacia strebado al efektiva demokratio kaj progreso.

La demokrata eduko estas decidiga faktoro en reciproka kompreniĝo kaj amikeco inter la nacioj. Ĝi devas efike kontribui al kreado kaj konservo de la paco tutmonde, antaŭ ĉio malfermi esperigan perspektivon de feliĉa estonteco, kiam la homo per sia laboro fariĝinta « mastro kaj proprumanto de la naturo », uzados ĉi tiun miregindan potencon en la servo por justeco kaj komuna bonfarto de ĉiuj popoloj.

## LA PRINCIPOJ

1. Demokrata eduko devas kontribui al kreo de harmonie disvolviĝanta homo, edukata en la spirito de l'demokratio, paco kaj amikeco internacia.

2. La eduko devas esti ĉiufianka. Ĉiu homo de kia ajn raso, nacieco, religio, sekso, socia kaj materia posteno, rajtas edukiĝi kaj kleriĝi responde al samtempaj vivbezonoj ĉiugrade. La kleriĝo estu deviga kaj senpaga, prezentata en la gepatra lingvo de la lernantoj, por ebligi al ĉiu nacio evoluigi la propran kulturon,



3. La eduko devas ekipi junularon per amasordigitaj sciaĵoj. Surbaze de ĉi tiuj konoj formiĝas en la homo scienca mondokoncepto kaj ĝusta vidpunkto al realeco, kiuj ebligas al junularo kompreni la leĝojn de natura kaj socia evoluado. Necesas disigi lernejon de eklezio,

4. La demokrata eduko devas al ĉiu certigi la disvolvon de ilia racia, morala, estetika kaj korpa kapablecoj, doni eblecon por libera elekto de profesio kaj de ĝia ŝanĝo laŭ pli malfrua deziro kaj individueco de unuopulo kaj laŭ bezono de la socio.

La lernejo ne devas limiĝi je konstato pri kapablecoj de infanoj kaj junularo sed evoluigi ilin en la eduk-kaj instru-procedo ĉe geknaboj.

5. La demokrata eduko devas fiksmemorigi al junularo profundan estimon al homo sen ia ajn diskrimino de sekso, raso kaj nacieco, profundan malamon al ekspluatado kaj milito, amon al paco kaj firman volon plej intense strebadi pri disvolviĝo de amikeco internacia. Lernejo ne devas esti ilo de militismo, fokuso de propagando militista.

6. La edukado devas konsciigi junularon, ke laboro estas la fonto de ĉiuj materiaj kaj kulturaj progresaj, akiritaj de homa socio; ĝi devas fiksmemorigi estimon kaj amon al laboro kaj al homo laboranta, lernigi ĝin aktive eluzadi ĉiujn sciencinventojn por la bonfarto de la popolo.

7. Le demokrata eduko, baziĝanta sur respekto al homa personeco, postulas ke la instruisto rilate al lernanto estu tre pretendema. Sed samtempe ĝi malpermesas tiajn praktikojn kaj aranĝojn, kiuj humiligas homdignon, kiel ekzemple korppunado.

8. En lernejo la eduko devas efektiviĝi harmonian koneksecon de personaj kaj kolektivaj interesoj de lernantoj.

La kolektivo de lernantoj en konstanta kontakto kun la naturo kaj socio devas krei konscian rilaton de junularo al ĝia estonta tasko en la vivo, por ke la organizo de homa socio servu al interesoj kolektivaj de la nacio. Tia kolektiva eduko kreas kondiĉojn por konscia disciplino, disvolvas amon al komuna laboro, edifas la senton por respondeco en kaj ankaŭ ekster la lernejo.

9. Junularo devas esti edukata en la spirito de patriotismo kaj amikeco internacia. La eduko devas direkti la kreoforton kaj kapablecojn de junularo al strebado pri la paco, kunvivo kaj kunlaboro inter landoj de diversaj sociaj reĝimoj, por progreso de ĉiuj nacioj kaj por feliĉo de tuta homaro.

10. La demokrata eduko de junularo en la spirito de ĉi tiu ĉarto devas fariĝi la komunafero de lernejo, socio kaj familio, kiuj devas kunlabori kaj certigi harmonian formiĝon de l'infana personeco.

11. La demokrata eduko necesigas edukistojn demokratajn, kiuj estas elkore sindonaj al la tasko kaj al tuthomaraj interesoj kaj posedas adekvatan eruditecon. Nur tiaj edukistoj povas respekti l'infanan personecon, nur ili kapablas edukadi demokratajn civitanojn entuziasmigitajn per profunda sento de civitana respondeco.

12. Por ke ili plenumu sian noblan taskon, la instruistoj devas labori kun ĉiuj demokrataj organizoj de la socio, antaŭ ĉio kun la organizaĵoj de laboristoj. Ili devas lukti pri l'unueca movado sindikata nacia kaj same pri la internacia.

Por sia laboro la instruisto rajtas pretendi salajron kaj tiajn viv- kaj labor-kondiĉojn, kiuj respondas al lia misio en la socio. Li ne devas esti maltrankviligata nek persekutata tial, ke li efektivigas la principojn de l'edukado demokrata, kiujn enhavas ĉi tiu ĉarto, aŭ pro tio, ke laŭ ĝiaj principoj li laboras en forumo publika.

Laŭ « Učitelské noviny » 3-3 1958 tradukis JANA CICHOVA (Praha 9).



# MANSKRIBO

---

De pluraj jaroj dormetadis en mia cerbo la intenco verki plendon kaj sugeston pri manskribo.

Antaŭ pli ol kvindek jaroj, kiam mi komencis korespondadi kun gesamideanoj de nacioj al mi fremdaj, mi rimarkis, ke ili skribis preskaŭ ĉiun literon de la latina alfabeto aliforme ol mi krom la litero O, kiun ĉiu skribis samforme. Pro tiu diferenco de literoj estis al mi ĝeno legi kelkajn vortojn de miaj korespondantoj. La litero N estis simila al U kaj inverse. La M povis esti legata ankaŭ kiel IU aŭ UI; la litero A estis kiel EI aŭ OI. Kun tempo mi pli aŭ malpli sukcesis deĉifri la, al mi, strangajn literojn. Eĉ nuntempe post multjara sperto pri skriboj de diversaj nacioj, mi perdas multe da tempo por legi kelkajn manskribojn de personoj mezaĝaj.

Anstataŭ klare skribi sian nomon ĉe la fino de sia letero la korespondanto metas ian strekon, kio devas reprezenti lian nomon; tiuj strekoj neniel reprezentas eĉ unu literon de la latina alfabeto. Tiuj strekoj ne estas metataj por esti legataj aŭ komprenataj, kaj por meti ilin kaŭzas nur malŝparon de tempo, de energio kaj de inko. Tiaj hieroglifoj, evidente, celas sugesti al la leganto de la letero pri ia eduka supereco de la strekinto. Ne estas ia senco en tiu faro.

Kelkfoje oni povas legi en ĵurnaloj ĉe la fino de kopio de iu oficiala dokumento aŭ dekreto la vortojn « subskribo nelegebla. » Tio igas min demandi al mi, ĉu tiu oficisto ne kapablas skribi sian nomon? Se ne, kiel estas, ke li okupas postenon kiel direktoro aŭ ĉefo de registara aŭ urba departemento.

Antaŭ mi estas kopio de oficiala urba dekreto, presita en ĵurnalo, kies dato estas la 27-a de februaro 1956, do, ne tre malnova kaj anstataŭ la nomoj de du altrangaj respondecaj oficistoj, estas presita « subskribo nelegebla ». Meti hieroglifojn, anstataŭ subskribon ĉe oficiala komunikaĵo, estas ofendo al la ĝenerala publiko, al la ricevinto, al la interesato kaj al la legantoj. Se iu oficisto ne kapablas, aŭ ne kuraĝas, klare skribi sian nomon ĉe oficialaj dokumentoj, li neniel rajtas okupi gravan postenon en iu departemento de iu ajn organizaĵo. Direktoroj de oficejoj, ja, ĉiuj oficejistoj devas esti sufiĉe kleraj por almenaŭ skribi sian nomon legeble.

Jam de longe mi volis protesti kontraŭ ĉiuj hieroglifaj substrekoj, kaj mi estis obsedata de la bezono, ke en ĉiuj lernejoj de civilizitaj landoj la ĝinstruistoj faru specialajn penojn por insisti, ke iliaj lernantoj akiru la arton de legebla skribado. Mi diru, ke nuntempe la lernantoj multe pli klare kaj bele skribas ol iliaj geavoj, multaj el kiuj ne povis fini elementan lernejon pro la neceso labori por gajni sian vivrimedon je frua aĝo.

Kio vekis mian cerbon kaj donis al ĝi la necesan energion verki kaj skribi pri la temo de manskribo? Estis artikolo, kiu aperis en la angla semajna gazeto « News of the World » (Novaĵoj el la Mondo) kun dato de la 9-a de marto 1958, en kiu mi legis en angla lingvo la sekvantan artikolon de S-ro Victor Wyeth, ĵurnalisto, kiu skribis:

« Sajnas, ke mia kolego S-ro A. Noyes Thomas (Nojz Tomas), (alia ĵurnalisto ĉe la sama gazeto) iome tro ŝovis sian kolon lastan dimanĉon, kiam en tiu ĉi el kolono li metis postskribon al la rakonto pri la speciale bela manskribo, kiun li ricevis de 81-jara londonano, S-ro E. J. Hammond.



Eble vi ankoraŭ memoras, ke S-ro Noyes Thomas ŝerce skribis: — Rigardante tra la resto de miaj poŝtaĵoj mi povas nur diri: « pli junaj legantoj imitu lin. » Rapide venis brikpeco, ĵetita de dekunu-jara Jennifer Kinnis (Jenifer Kinis) en St. Leonards-on-Sea, Anglio.

### JEN KION ŜI SKRIBIS

« Mi petas, ke vi ne kulpigu nur gejunulojn pri iliaj manskriboj, » skribis Jenifero en tre legebla skribo. « Iom da riproĉo oni adresu al la sistemo de edukado. » Por klarigi, Jenifero aldonas: « Ĉe la junula lernejo, kiun mi ĉeestadis, oni instruis al mi tiun ĉi stilon de skribo. Lastan septembron mi transiris al duagrada lernejo, kie mi ne estas permesata skribi-tiel, kiel mi nun skribas al vi, sed de nun mi devas skribi kursive. »

### JENIFERO AMASIGAS POENTOJN

El enketoj, kiujn mi faris ŝajnas, ke Jenifero trafis la punkton. Iu oficisto ĉe la Ministerio de Edukado diris al mi, ke pri edukaj aferoj kiel stilo de manskribo, instruata en lernejoj, estas la koncerno de la aŭtoritatoj de loka edukado.

Kaj la vicdirektoro de la edukada aŭtoritato de la urbo en kiu vivas Jenifero, diris, ke « la stilo de manskribo, instruata en lernejoj, estas lasata al la decido de la ĉefinstruistoj. Ni konceptas lernejojn esti unuaĵo simila al ŝipo, kies direktoro okupas postenon kiel kapitano de ŝipo. »

### MIA LORDINO SKRIBAS KURSIVE

Antaŭ nemultaj jaroj Lordino Cholmondeley, (prononcata Chumley - en Esperanto Cumli), edzino de la Markizo de Cholmondeley, prezidanto de la societo por kursiva manskribo, preskaŭ persvadis min adopti tiun skribon. Ŝi diris al mi, ke, se oni persistas dum tri au kvar semajnojn, oni povos skribi kursive rapide. Persone mi ŝatas la kursivan skribon. Malfeliĉe por miaj amikoj, (mi ne menciis la linotipistojn, kiuj devas komposti tiun ĉi presaĵon), mi ne persistis kun ŝi. Do, kiam estas necese, ke mi skribu gravan leteron, kiun la ricevonto povos legi kaj kompreni tuj, mi barakte frapadas la klavojn de mia skribmaŝino.

Ne restas al mi ia dubo, ke la plimulto da geknaboj, kiuj devas ŝanĝi al la kursiva skribo, faros tion sen iu ajn kontraŭstaro, kaj ke Jenifero trovos konsolon en la fakto, ke multaj publikaj lernejoj, inter ili « Eton » kaj « Harrow » kaj centoj da ŝtataj lernejoj, jam uzadas ĝin. »

En mia opinio, se la PRESLITERA skribo, uzata de miaj korespondantoj el Germanio, estus instruata en ĉiuj lernejoj, baldaŭ la manskribo de ĉiuj estus multe pli bela, facile legebla, kaj pli rapide skribata ol la nuna kunligita skribmaniero kun fantaziaj literoj.

Se iuj urbaj kaj registaraj oficistoj, kaj aliaj en oficialaj postenoj, ankoraŭ ne kapablas legeble skribi sian nomon en skribo kursiva, mi rekomendas, ke ili iomete ekzercu skribi preslitere, kaj ili estos mirigataj, ke post kelke da semajnoj, ili povos rapide kaj bele skribi, kaj ke iliaj amikoj senĝene povos legi iliajn leterojn kun plezuro kaj sen perdo de valora tempo. « Tempo estas mono » diras la malnova proverbo.

E. E. YELLAND  
ASPREMONT A.M.  
25-an de marto 1958.



# Esperanto en finna lernejo

Ni mallonge raportis (IPR p. 57) pri la enkonduko de Esperanto kiel eksperimenta fako en finna lernejo. Jen dokumentoj pri tio.

## Instrua plano de la Geknaba lernejo de SOMERO (Finnlando)

(ekstrakto el la mezlerneja parto)

	Sekcioj:	Klasoj					S	
		1.	2.	3.	4.	5.		
Gepatra lingvo .....	A	5	3	4	3	4	19	
	B	5	5	4	3	4	21	
	C	3	4	4	3	4	18	
Biologio kaj geografio .....	ĉiuj	5	4	4	4	4	21	
Sveda lingvo .....	A	4	2	3	3	3	15	
	B+C	—	—	4	4	4	12	
Unua fremda lingvo: ,	angla .....	—	5	5	4	4	18	
	germana .....	B	4	5	4	3	3	19
	— .....	C	—	5	4	3	3	15
	esperanto .....	C	6	1	1			8

NOTOJ. — La ciferoj signifas lecionojn posemajne.

1. La leciono daŭras 45 min.

3. Unu semajna leciono de biologio povas esti anstataŭata per 3-4 taga ekskurso dum ferio somera.

4. En la sekcio C de la meza lernejo estas instruata, ek de la dua klaso ĝis fako (ekz. geografio) per esperanto; tiu fako ricevas po unu semajnan lecionon en la klasoj 2. kaj 3. (Vidu la linion « Esperanto »).

6. En la liceaj klasoj la lernintoj de la angla lernas la germanan kiel duan lingvon, kaj inverse; 3 klasoj, 10 lecionoj sem., eventuale la francan aŭ latinan.

8. Transiro; 1958-59 sekvas la planon A (=la ĝisnuna) la klasoj 3.-5; la sekcioj B kaj C same en la 2. klaso, kun la escepto ke la fremda lingvo estas germana. En sekvaj jaroj la antaŭenirantaj klasoj laboras simile.

La supran instruan planon aprobis la Instrua Administracio en sia hodiaŭa kunsido, kaj konfirmis por uzado dum 1958-63.

Helsinki, Instrua Administracio, la 2: an de Julio 1958

Cefdirektoro R.H. Oittinen  
Supera inspektoro Olli Sampola

En aneksita letero la Instrua Administracio devigis la direkcion de la Geknaba lernejo en Somero prezenti skriban studon pri la rezultoj de la eksperimentoj, entenataj de la plano.

### Argumentoj por la proponita instrua plano

(prezentitaj kun la propono al la Instrua Administracio).

Mia propono pri la plano entenas plurajn punktojn, konsidereblajn kiel eksperimentoj. Ĝi tamen evitas devion de la nuna instrua leĝaro. Laŭ mia kompreno ĝi ne enhavas

ion, kio povus endanĝerigi al la lernantoj la atingon de la scioj kaj kapabloj, kiujn oni nuntempe atendas de la duagradaj lernejoj. Kontraŭe, mi atendas pozitivajn rezultojn el la eksperimentoj por kelkaj problemoj de nia instruo kaj eduko aktualaj.

Jen la plej gravaj objektoj de eksperimentado:

1) La instruo de fremdaj lingvoj estas tiom peza ŝarĝo al nia lernejo, ke oni nepre demandas, ĉu la instruo pro tio ne fariĝas mankhava rilate al la vere klerigaj fakoj. Verŝajne ne multe gravas la kapablo pli-malpli kontentige povi esprimi samajn ideojn



per pluraj lingvoj, precipe, kiam ĉe tro granda nombro da lingvoj la nombro de lecionoj por ĉiu el ili restas tiel malgranda, ke oni tre malmulte povas atenti la kulturajn trezorojn de ili. La tuta instruo restas enkapigo de formaĵoj kaj vortlistoj. Plej ofte estas dubinde, ĉu la lernanto post 7-8-jara lernado kapablas ĝui la belliteraturon de iu el la lernitaj lingvoj. Eble tio estas ebla por 10 % de abiturientoj; el la finintoj de meza lernejo neniu.

Ĉar kelkaj el niaj plej eminentaj lingvaj pedagogoj (supera instr. L. Almila kaj prof. M. Biese) pretendas, ke angla lingvo estas tre malbone taŭga por enkonduko en la lingvolernadon (same kiel la sveda en la nurfinna kamparo), ni volas enkonduki kvar alternativojn:

- a) 1.kl. sveda, 2 kl, angla (=ĝis nun en Somero), sekcio A.
- b) 1.kl. sveda, 2.kl. germana (transira tempo), B kaj C de 2.kl.
- c) 1.kl. germana, 3.kl. sveda, sekcio B.
- d) 1.kl. Esperanto, 2.kl. germana, 3.kl. sveda, samaj hornombroj kiel supre en c), sekcio C.

Donitaj al simila lernantaro, la alternativoj a kaj b signifas komparon de la germana kaj la angla. La alternativo c) klarigus, ĉu la germana estas pli konvena kiel enkonduka lingvo ol la angla.

Laŭ mia kompreno, la alternativo d) estas la plej grava kiel eksperimento. Tie la instruon de fremdaj lingvoj komencos facila kaj tute regula lingvo, kiun oni jam dum la unua lernojaro ekposedus kontentige en parolo kaj skribo, eĉ en tia grado, ke oni povus en la sekvaj jaroj instrui iun fakon per Esperanto (por certigi la rezultojn en la lernado de tiu fako mi tamen aldonas por ĝi 1 semajnan lecionon en du klasoj). La tiel atingita kapablo uzi fremdan lingvon kuraĝigas la lernantojn kredi je tio, ke estas eble en la lernejo atingi uzkapablon de fremda lingvo, kaj ĉi tiu fido subtenus la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj - kiel oni konstatis per eksperimentoj en kelkaj landoj - en tia grado, ke la lernintoj de Esperanto eble ricevos eĉ pli bonajn rezultojn en la fremda nacia lingvo ol tiuj, kiuj lernis unu jaron pli longe. Samtempe la scio de Esperanto do estas ricevata kvazaŭ senpage. Kaj ankaŭ la kono de ĉi tiu lingvo ne estas senvalora en la nuna tempo, konsiderante vojaĝadon kaj kontaktojn kun fremdlandanoj. Almenaŭ

la lernantoj, kiuj finas je la meza lernejo, jam posedus uzeblan kaj utilan lingvoscion.

Estus grave ankaŭ esplori, kian utilon ĉi tiu internacia lingvo donus al la lernado de la gepatra lingvo, kaj en kia grado ĝi certigas la uzon de kulturvortoj.

Por povi juĝi la rezultojn estus necese daŭrigi la eksperimenton almenaŭ dum kvin jaroj.

Somero, la 23-an de junio 1958.

Joel Vilkki (subskribo) rektoro.

## Antaŭlaboroj

Antaŭ la definitiva propono de rektoro Vilkki okazis tri iom longaj pritaktoj de la afero kun lerneja konsilanto (pri fremdaj lingvoj) doktoro Pennanen kaj supera inspektoro de lingvinstruo O. Sampola, pledantoj por Esperanto-rektoro Vilkki kaj mag. Setälä. Kaŭze de tiuj interkonsiliĝoj, kie la esperantistoj devis respondi al diversaj detalaj demandoj de la oficistoj, oni transdonis al ili dikan aktaron pri la temo, kies enhavon ni resumos poste. *Montriĝis tamen, ke tiu aktaro verŝajne ne estis trastudata, sed ke la opinio ĉe la decido estis ĉefe dependa de la impresoj, kiujn donis la interkonsiliĝoj.*

Resumo de la donitaj dokumentoj:

1. *Noto pri la internacia situacio lingva, tutmonda.* — Kutime oni uzas unu aŭ plurajn privilegiitajn lingvojn, eventuale kun samtempa traduko. Granda perdo de tempo kaj mono, la interkompreno dependas de tradukistoj, senpera kontakto mankas. Nur malmultaj povas diri kion ili volas, kaj devas kontentiĝi diri tion, kion ili povas; ili estas en nefavora situacio ĉe debatoj.

Nur kun uzo de Esperanto kiel sola lingvo (kiel faras ĉiujare 10-20 mil personoj) oni evitas la bezonon de interpretistoj, ŝparas tempon, certigas la komprenon, egaleco regas. Post enkonduko de Esp., tiu stato ĝeneraligĝos.

Ĉar oni ne povas atendi rekomendon de UNESKO aŭ iniciaton de iu el la grandaj potencoj, estas necese ke la malgrandaj pioniroj. La vojo povus esti jena: 1. eksperimenta instruo en pluraj landoj. 2. interkonsento inter kelkaj ŝtatoj pri enkonduko grada de Esperanto en la seminariojn kaj lernejojn. Tiurilate atentigo pri la iniciatoj de Aŭstrio Post tio oni povus atendi, ke la aliaj iom post iom aliĝos.



2. *Noto pri la nuna praktika valoro de Esperanto.* — La delegita reto de UEA. Internacia korespondo. En kunvenoj, seminarioj, ktp, kie E estas la sola lingvo, partoprenas ĉiujare pli ol 10.000 personoj. La vojaĝoj per E. kompreneble kiel tutaĵo estas kvante malgranda kompare kun la tuta turismo. Tamen, ekz. el Finnlando la plej multaj partoprenas societajn vojaĝojn, ĉe kiuj nur unu aŭ kelkaj estas lingvosciaj. La plejparto havas nenian kontakton kun la popolo krom per la interpretisto, laŭ tiom kiom ĝi sekvas lin. Ni povis tamen konstati, ke la plej multaj eĉ ne havas intereson al kulturaj vidindaĵoj, sed kuradas en magazenoj por aĉetaĵoj. La esperantistoj renkontas leterkonatulojn, faras vizitojn, eĉ restadas en amikaj hejmoj, el kiuj ili reciproke akceptas gastojn en sia hejmo, kaj tiel konatiĝas kun la vivo de la popolo mem. Rimarkindaj estas ankaŭ studvojaĝoj, ekz. popollernejaj instruistoj, sciantaj nur E=n, trovas vojon al samfakanoj en fremdaj landoj.

3. *Spertoj pri instruo vidpunkte de finno.* — Aldone al la fonetika alfabeto de finna lingvo (malriĉa je konsonantoj ni lernas elparoli kaj ekkoni distingi b, d, g, f, ŝ, z, ĵ ĉ = tŝ, ĝ = dj).

Ni lernas amason da kulturvortoj kaj ekkoni aliajn laŭ etimologiaj konjektoj.

Ni lernas kompreni la idiotismojn de nia propra lingvo, kaj tiajn de la fremdaj.

Esperantisto pli bone lernas fremdajn loknomojn prononci kaj kompreni ekz. en radio.

4. *Esperanto kiel testa lingvo.* — Raporto de Richard Pfütze el Büsum (Germanio).

5. *Aldonoj.* — Diversaj presaĵoj: Raporto de lingvistoj E. N. Setälä, B. Collinder, J. Stenström. Ligo de Nacioj kaj E. Rapport sur la langue internationale E. The international language and the contribution „to .. UNESCO Seventy years of I.L. Esperanta Finnlando 4/1948. The educational value of E. How can colleges promote... Raportoj de Margaret Kennedy kaj Erika Linz. The chief obstacles to international understanding.

(La plej multo estas konata al la esperantistaro; la raporto de prof. E.N. Setälä aperis en franca lingvo en Journal de la Société Finno-Ougrienne kaj estas ricevebla kontraŭ 8 respondkuponoj de subskribinto Setälä. La raportoj de Collinder kaj Stenström estas svede eldonitaj de Sveda Esp. Federacio. La plejparto de la aliaj devenas aŭ de CDE aŭ de BEA).

Helsinki, la 20-an de julio 1958

Joel Vilkki Vilho Setälä.

## GRAJNOJ EN VENTO

Estas lerneja organizo tutmonda, kies rondoĵ tri-foje en la jaro - en marto, junio kaj novembro - eldonas en la nombro 20 ekzempleroj kaj en la normigita komerca formato 21×29,7 centimetroj libere verkitajn tekstojn kaj desegnaĵojn. GRAJNOJ EN VENTO disvastigas Esperanton ĉe la infanoj kaj, kun la infanoj, kunlaboras al frateco kaj paco en la mondo: Skribu al ni, ĉu vi estas preta kunlabori aŭ ĉu, eble, vi konsentas fariĝi gvidanto de nova rondo. Aldonu int. resp. kuponon!

**Adreso:** GRAJNOJ EN VENTO, Marcel Erbetta, rue des Pins, 66, **Bienne-Biel**, 7, Svislando-Suisse.


★

## ALVOKO

La Dua Rondo « ĉiam Antaŭen! » de « Grajnoj en Vento » pro objektivaj kaŭzoj devis interrompi sian regulan aperigadon de la infankajero. La nova reorganiziginta eldonkomitato certigis la materiajn rimedojn kaj nun ambaŭmane atendas vian kunlaboron. Per la kontribuo helpu, por ke ni al niaj mecenatoj povu pruvi la praktikan valoron de E. por la lernejoj infanoj. Sub la devizo: « PER LA INFANOJ AL LA INTERPACIGO DE LA MONDO! » ni daŭrigu la laboron kaj montru la vojon por la pli bela estonto. La kontribuoj en 20 ekzempleroj sendu, se iel eble ĝis la 15-a de marto 1959.

Anticipe dankas Zvonko Rehoří, UEA del. k instruisto, Srebrnjak 47, Zagreb III Jugoslavio





## SUR VIAN

### RETORIKO

D-ro Ivo LAPENNA: *Retoriko, kun aparta konsidero al esperantlingva parolarto. Dua eldono ferverkita kaj kompletigita. Eldono de la aŭtoro, Rotterdam, 1958, 294 paĝ. Prezo: 11.- gld. bindita, 9.- gld. broŝurita.*

La dua eldono de *Retoriko* de d-ro Lapenna aperas en pli impona vestaĵo ol la unua, aperinta en Parizo en 1950. Ĝi estas bele bindita kaj enhavas portreton de la aŭtoro, - nur la kvalito de la papero povus ankoraŭ esti pli bona.

En la dua eldono troviĝas, krom la antaŭparolo al la unua eldono de Reto Rossetti, antaŭparolo al la dua eldono verkita de G. Waringhien.

Ambaŭ eldonoj konsistas el du partoj, unua parto pri la lingvo kaj dua parto pri la retoriko, kun kelkaj paroladoj komentitaj. En la dua eldono troviĝas krome detala indekso.

Komparo de la ampleksoj de la du partoj lingva kaj retorika en la du eldonoj montras ke la lingva parto preskaŭ duobliĝis (de 53 ĝis 93 paĝoj), dum la retorika parto reduktiĝis per kvarono (de 167 ĝis 126 paĝoj).

Se oni iam havis la plezuron aŭskulti paroladon de d-ro Lapenna, la Demosteno de la espra retoriko, oni retrovas en lia verko teoria pri lingvo kaj retoriko lian eminentan kapablon praktikan pri esp. kaj pri la parolarto. Per belaj frazoj li scias prezenti siajn ideojn tiel frappe ke post la legado oni havas fortan konvinkon ke la ideoj de la aŭtoro estas ĝustaj kaj nekontestebaj. D-ro Lapenna estas elokventa, laŭ sia propra difino de la elokventeco (p. 119) kiel « naturo talento paroli bele, trafte kaj konvinke ».

Kaj kiun ne kovinkos lia prezento de la retoriko? Kiu estas pli sperta ol li pri tiu temo? Al ĉiu kiu deziras ekkoni la arton konvinki pri vero aŭ pri malvero, estas rekomendata *Retoriko* de d-ro Lapenna. Kaj kono de tiu arto estas tre utila ne nur por oratoroj estantaj aŭ estontaj, sed ankaŭ por aŭskultantoj kiuj deziras esti konvinkataj ne per la elokventeco de la oratoro sed per liaj argumentoj.

Ne malpli elokvente ol la dua, retorika parto de *Retoriko* estas verkita ĝia unua, lingva parto, en kiu la konata juristo prezentas siajn ideojn pri la ekesto de la lingvo, la lingvo kiel socia fenomeno, la faktoroj influantaj la lingvoevoluo, la formiĝo de komunaj lingvoj (ekz. la greka kaj la latina lingvoj kaj esp.), kaj la rilatoj inter lingvo kaj penso.

En la ĉapitro pri la ekesto de la lingvo d-ro Lapenna konkludas (p. 59) ke estas « senduba scienca konstato » ke « la lingvo evoluas de la iama tre granda diverseco al pli aŭ malpli baldaŭna unueca komuna lingvo », kion instruas, laŭ p. 49, la t. n. jafetida teorio de la soveta lingvisto Marr (1864-1934). Kion diras pri tio la kompetentuloj? Zorga prezento de la lingvistikaj teorioj de Marr estas la monografio de Lawrence L. Thomas, *The Linguistic Theories of N. Ja. Marr*, University of California Publications in Linguistics, Vol. 14, Berkeley and Los Angeles, 1957, 176 p. Ĝin resumis kaj recenzis en la revuo *Romance Philology*, Vol. XII, n-ro 1, aŭg. 1958, p. 68-71, la norvega lingvisto Hans Vogt. Li skribas pri la libroj de Thomas: « Konsiderante la naturon de la teorioj prikritaj, mi eĉ demandis min ĉu la dediĉon de eble jaroj de pacienca laboro meritis la rifuto de teorioj kiujn neniu homo ne perdinta sian prudenton iam povus konsideri serioze, kaj kiuj nun estas pli mortaj ol in ajn teorio de scienca pensado de nia tempo. » La perzentoj kaj la juĝoj en tiu ĉapitro de d-ro Lapenna do estas tute eraraj. Tion kaŭzas i. a. la fakto ke li ne klare distingas inter la demando ĉu ĉiuj hodiaŭaj lingvoj havas komunan originon (pri kio ni scias nenion) kaj la tute alia demando ĉu lingvoj pruvitaj parencaj havas komunan originon (pri kio konsentas la fakuloj). Kaj tiun konfuzon ŝajn kaŭzas lia nescio pri la metodoj de la t. n. kompara lingvistiko (ne estas ĉi tie spaco por prezenti tiujn metodojn, interesatoj legu ekz. *Language* de Bloomfield (1933, ĉap. 18) aŭ *Introduction à l'étude comparative des langues indo-européennes* de Meillet (7. eld. 1934, ĉap. 1). Nu, la lingvistiko ja ne estas la fako de d-ro Lapenna, antaŭa profesoro pri internacia juro en la universitato de Zagreb; - kiom da specialistoj konas la metodojn de aliaj sciencoj ol sia propra?



# LIBROBRETON

Neniam en la parto lingva d-ro Lapenna forgesas esp-on, kaj oni povas konsideri la tutan parton kiel pledon por laŭ li ĝusta takso de esp. kiel lingvo kiu diferencas de la naciaj lingvoj nur per tio ke ĝi estas internacia. Tute prave ĝi ne neas la fakton ke la strukturo de esp. estas artefarita aŭ eĉpensita de unu homo, sed nur la konkludon falsan sed bedaŭrinde oftan ke ĝi estus « tial sen eblecoj evolui, sen literaturo, sen karaktero de vivanteco... kun la una rezulto, ke ĝi entute ne estas lingvo » (p. 66), kaj por eviti tiun konfuzon li konsilas ne uzi la esprimon « lingvo artefarita », kiun li fleziras anstataŭigi per la esprimo « lingvo internacia ». Laŭ d-ro Lapenna ekzistas nur unu internacia lingvo, nome esp., kiun li tial preskaŭ konsekvence nomas « la Internacia Lingvo », dum la aliaj artefaritaj lingvoj laŭ li ne estas lingvoj sed nur « projektoj de internacia lingvo ». Nia eminenta propagandisto sendube pravas ke en propagando validas pli la demando socia ĉu lingvo vivas aŭ ne, ol la demando lingvistika kia estas ĝia strukturo kaj kiel ekestis tiu strukturo.

Kvankam oni ne legu sen kritiko la unuan, lingvan parton de *Retoriko* - oni neniam legu sen kritiko -, la libro de d-ro Lapenna meritas legadon pro sia prezento de la retoriko kaj pro sia bonega stilo.

Povl SKARUP.

## UNITARISMO - REALIGITA HOMARANISMO

Kompilita kaj tradukita el la angla de Rüdiger EICHHOLZ, 1958, *Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado* - 60 p. 14x21.

Jen aro da tekstoj kaj paroladoj kiuj en agrabla kaj konkreta maniero, prezentas la pensovojojn de Unitarismo. Temas pri religia sistemo kiu deirinte de kristanismo volas, per studo de la instruoj de ĉiuj grandaj religioj kaj filozofoj, atingi la universalan kaj eble plej bonan iel akcepteblan tra la tuta mondo de la diversreligiaj kredantoj. Nobla celado sed ĉu realigebla? La lasta parolado interese pritraktas la nunajn problemojn de paca kunekistado kaj mondopaco.

Generale bona kaj simpla lingvaĵo. (P. 31: « Beringa strato » estas anglismo: devas esti « B. markolo »).

## FOLIOJ EL LA BILDOLIBRO DE DIO. PENTEKOSTA BRILO SUPER LA VIVO

De MARTINUS. 6-a volumo de la *Spirit-Scienca Instituto de Martinus. Kopenhago* 1958. 96 paĝoj 12,5x19. Tole bindita.


La unua verko prezentas simblan komparon inter alveno, esto kaj forŝoviĝo de somera tago kaj la rilatoj kiujn havas perfektulo al siaj kunhomoj. La suno de l'somera tago formalaperigas la ombrojn de l'nokto, vivigas ĉion kaj postlasas dolĉan varmon; same la radiantaj simpatio, la viviga amo al la proksimulo alportas helon kaj varmon en la korojn de ĉiuj kunestantoj. Tiaj sunoj de amo, Martinus invitas nin esti.

La dua verko estas alia simbola komparo inter la malhela vintro kaj la multpromesa brilo de la kristnaska nokto, inter la verdiĝanta printempo kaj la paska festo kaj inter la radiantaj somero kaj Pentekosto, la festo de la ĉionentena amo.

Mirveka estas tiu prezento en kiu tiom edife edziĝas profunda poezio kun altfluga filozofado, kiu lasta paradokse estas aplikenda en la ĉiutago, almenaŭ de homoj sufiĉe evoluintaj, sufiĉe larĝanimaj. Ni konfesu, ke ni ĉiuj devas multe progresi...

Kiel kutime, per tiu libro Martinus turnas sin al homoj, kiujn povas kontentigi nek la varma sento de la religioj, nek la malvarma racio de la materiisma scienco. Ankaŭ kiel kutime la lingvaĵo ŝuldiĝas al C. Graversen kaj estas bonega; ĝi krome estas kontrolita de la daŭre anonima Literatura Komitato de SAT.

A. A.





---

★

## NIAJ PERANTOJ

**AUSTRA:** O. St. R., **Dr E. J. Goerlich**, Wien, IX, Waehringerstrasse 59. Poŝtĉeka konto: 30 461. Jarabono: 32 aŭstraj ŝilingoj.

**BRAZILA:** **Cooperativa Cultural dos esperantistas**, Caixa postal 3 881 Rio de Janeiro D.F. Jarabono: 90 Kruzeroj.

**BRITA:** **The British Esperanto Association**, 140 Holland Park Ave., London, W 11. Jarabono: 9 ŝilingoj.

**BULGARA:** **Bulgara Esperantista Asocio**, Bul. Stalin 40, Sofia. Jarabono: 9 levoj.

**DANA:** **Dansk Esperanto-Ferlag**, Ingemannsvej 9, Aabyhoj. Poŝtĉeka konto: 16 295. Jarabono: 9 kronoj.

**GERMANA:** **Helmut Rössler**, 22b, St-Martin. Poŝtĉeka konto: 43 357 Ludwigshafen/Rhein. Jarabono: 5 markoj.

**HISPANA:** **E. Calvet**, Pl. Gral. Sanjurjo, 7, Tarragona. Konto N° 956 293 ĉe Banco Espanol de Credito. Jarabono: 55 pesetoj.

**HUNGARA:** **Martin Lajos**, Esperanto, Bors-u-2, Budapest XII. Jarabono: 24 forintoj.

**ITALA:** **Eduardo Zumbo**, Casella Postale 226, Torino. Jarabono: 750 liroj.

**JUGOSLAVA:** **Josip Vajdlj**, Podolje 15, Zagreb. Poŝtĉeka Konto: Gradska ŝtedionica, Zagreb, 40 KB 6, N° 4 653. Jarabono: 410 dinaroj.

**KANADA:** **Rüdiger Eichholz**, Esperanto Press, Oakville, Ont. Jarabono: 1,25 dolaroj.

**NORVEGA:** **Erling Holten**, Leangen i Strinda. Jarabono: kronoj. 9.

**NEDERLANDA:** **Verbruggen**, Oosterhesselenstraat 560, Den Haag. Jarabono: 3,5 guldenoj.

**POLA:** **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, ul. Kozią 3, Varsovio. Jarabono: 50 zlotoj.

**SOVET-UNIA:** **Roberto Dvorkin**, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad 22, Kirovskij 42.

**SUOMA:** **Joel Vilkki**, Somero. Poŝtĉeka konto: Tu 60 253. Jarabono. 400 markoj.

**SVEDA:** **Eldona Societo Esperanto**, Box 7 043, Malmö 7. Poŝtĉeka konto: 578. Jarabono: 6 kronoj.

**SVISA:** **Grajnoj en Vento**, IV-a 9 485, Marcel Erbeta, 66, rue des Pins, Bienne-Biel 7. Jarabono: 5 svisaj frankoj.

**USONA:** **Jarvis E. Bush**, 3 700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin. Jarabono: 1,5 dolaroj.

**ALIAJ LANDOJ:** Sin turni al nia administranto: **R. Delagneau**, Avrolles, par Saint-Florentin (Yonne), Francio, Poŝtĉeka konto: Dijon, N° 1448 87. Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn: Jarabono: 500 francaj frankoj, aŭ 17 steloj, aŭ 12 internaciaj respondkuponoj. Ni daŭre serĉas perantojn.